


**INTERNACIA
PEDAGOGIA REVUO**

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

Vicredaktoro:

Katalin Kováts

Kunlaborantoj:

Estraro de ILEI

Raita Pyhälä

Blazio Vaha

ENHAVO

Maŭro LA TORRE: <i>Mallevi la ambiciojn aŭ reorganiziĝi?</i>	1
Johano NEGRETE: <i>Instruado de E-o en la universitato</i>	5
Jomo IPFELKOFER: <i>Komparo de instrumentoj</i>	11
<i>Intervjuo kun Katalin Kováts pri edukado.net</i>	15
<i>Studoj pri interlingvistiko</i> (recenzo de Blazio VAHA).....	18
<i>Ĝi la landoj kaj sekcioj</i> (Balkanaj landoj, FI, ES).....	26
<i>Por via notlibro</i> (Juna Amiko; ILEI ĉe UNESKO; Kontakto; Elstaraj agadoj; Tutmonda Fabelkonkurso; Zaban-e-salam)	28
<i>Leterkesto</i> (Uwe Joachim Moritz).....	35

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Maŭro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673. <m.latorre@uniroma3.it>; http://lps.uniroma3.it
Kunordigado, rilatoj kun E-organizoj.

Vicprezidanto: Stefan MacGill, Bethlen Gábor u. 2, HU-2030 Érd, Hungario. Tel. (+36 23) 364 198. <stefan.macgill@galamb.net>
Eldona agado (inkl. periodaĵojn).

Sekretario: Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas v6, SE-641 37 Katrineholm, Svedio. Tel. (+46 150)52387 kaj (+46)708152387 (mesaĝoj). <agneta.emmanuelsson@liberal.se>
Membraro, sekcioj, komitato.

Vicsekretario: Sabine Trenner, Ruppinstrasse 8, DE-14770 Brandenburg / Havel, Germanio. Tel. (+49 3381) 794312. <trine@snafu.de>
Rilatoj kun lernejoj, trejnado, junularaj aranĝoj.

Estrarano pri financoj: Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

Estrarano: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36/14, YU-32000 Ĉaĉak, Jugoslavio. Tel. (+381) 32 371053, (oficeja) (+381 32) 302738. Fakso: (+381 32) 342101 <radp@ptt.yu>
Lernejaj projektoj, universitata agado.

MALLEVI LA AMBICIOJN AŬ REORGANIZIĜI?

Karaj gekolegoj,


komenciĝis la dua jaro de la nova jarcento, t.e. la 115'a jaro por nia internacia lingvo.

Sincere dirate, mi havas la impreson ke en ILEI, post kriza fazo de la pasintaj monatoj, nun ni povas ekrigardi al la estontumo kun plia fido kaj modera entuziasmo.

Dum lastaj jaroj ni kolektis kaj evoluigis multajn novajn ideojn pri farindaĵoj, konstruis kelkajn ambiciajn projektojn, diskutadis pri konvenaj ŝanĝoj en nia organizo. Tio en si mem estas pozitiva signo de entuziasma engaĝiĝo kaj de progresiga volo. Tamen pluraj niaj revoj ne komplete realiĝis kaj eĉ malkaŝis niajn strukturajn mankojn.

Nun ni estas antaŭ elekta disvojiĝo: aŭ ni draste reduktu niajn revojn, celojn kaj laborplanojn, por regajni kredeblecon; aŭ plej strebu al pliampleksigo kaj fortikigo de nia organiza strukturo, por igi ĝin kapabla atingi pli altajn celojn. La unua alternativo estas pli prudenta, persone malstreĉiga, kaj ... fakte kelkkaze ni realisme devas ĝin apliki. Sed ankoraŭfoje - ĉu malrealisme? - ni klopodos trairi la duan vojon, pli penigan, pli riskan, iam eĉ iomete angorigan, tamen pli kongrua al la Strategia Plano, kiun la Esperanto movado pasintjare donis al si (vidu IPR 2000/3/ p. 10, 2001/3/ p. 1).

Ĉi tie mi ne volas laŭte prediki, kiel voĉo krianta dezerte. Pli modeste mi provos indiki: unue la ĉefajn organizajn problemojn, kiujn ni alfrontu prioritare; due iujn projektojn, kiuj meritas nian reorganizan strebadon.



REORGANIZADO

En pluraj landoj aperis aretoj da instruantoj kaj instruistoj, kiuj esprimis la intencon fondi landan (aŭ regionan) sekcion de ILEI. Plurfoje tiaj subtenindaj voloj bedaŭrinde ensabliĝis pro nur administraj kialoj, ne atingante la celhavenon. Nun per ĉiuj niaj fortoj ni iel solvu tiujn barojn! Eĉ se tio kostos al ni kelkajn eŭrojn aŭ la elpenso de "ruzaĵ" elturniĝoj,

kiel la eksperimentado de novaj membrokategorioj, tamen dum la jaro ni per tio povos rikolti eble dekon da **novaj (aŭ reaj) landaj sekcioj**.

En aliaj landoj, **kie la sekcioj ekzistas**, sed silente treniĝas de unu jarraporto al la alia, kiel forfakaj klubetoj, ekster la influo al la granda lerneja kaj universitata mondo pri la lernado de nia kara lingvo, tie ni klopodu remalfermi niajn fenestrojn kaj pordojn, eĉ se virtualajn. Ĉu minimuma celego, tamen utila, ne povus esti ke ĉiu Landa Sekcio havu (kaj regule aktualigu) sian interretan **hejmpaĝon**? La internacia retejo de ILEI volonte gastigos (aŭ alligos) tiajn naciajn paĝojn, se viaflanke ekzistas la volo kompili ilin per informoj. Por la komunikado inter la LS-oj, ni memoru ke ekzistas la reta diskutgrupo [**ILEI-KOM**], kaj por la atingo de nemembroj, interesataj pri la lernigado de Esperanto ĉiam disponeblas la diskutejo [**E-INS**].

En multaj landoj troviĝas ankaŭ **Esperanto-Institutoj, E-kursejoj, E-Kulturaj Centroj** kaj/aŭ estrarano pri edukado/instruado en la **Landa Asocio de UEA**. Tiurilate baldaŭ ekos paralela kampanjo UEA/ILEI por kongrui kaj sinergiigi la agadojn de tiaj sendependaj, sed similcelaj instancoj, al kiu espereble la legantoj de IPR volos kunlabori laŭ siaj ebloj kaj cirkonstancoj.

Fine, se vere ni kredas ke Esperanto ne proponiĝas nur al la jamaj "samideanoj", sed ni volas pli vaste penetri la instruejan mondon, ege gravas ke ni atente kaj pacience "**popolnombro**", **diskonigu** kaj reale **apogu** la ŝvitan laboron de niaj avangardaj "tranĉeanoj", alivorte de niaj profesiaj (aŭ helpaj) instruistoj, kiu ĉiusemajne instruas la Internacian Lingvon en **bazaj, mezaj kaj universitatnivelaĵoj lernejoj**. De vi - tiuloj - ni atendas la datumojn, dum nia tasko estos aktualigi la **datumaran arkivon**, kaj publike disponigi ĝiajn rezultojn al ofte aperantaj interesatoj; alimaniere dirate, se vi provizos la informojn pri la lernejoj de via regiono, kie oni instruas aŭ iel priatentas Esperanton, kompanse vi povos legi similajn informojn pri ceteraj mondopartoj.

Pri ĉio supre menciita ni ekdiskutas en diversaj **movadaj strukturoj**: la Subkomitato de UEA pri edukado/instruado, la UEA-estraro, la landaraj komisionoj UEA/TEJO/ILEI, ktp.

PLANOJ, PROJEKTOJ, ... SOPIROJ

Sed kial reorganizigi? por fari kion?

Ideoj al ni ne mankas. Mankas sufiĉe nombraj kaj kvalitaj homaj laborfortoj. Tial ni alvokas vin mem kaj viajn taŭgajn konatojn, disponigi vin por kontribui al iu el la jen menciitaj projektoj.

1. KVAZAŬA LERNEJO TIBOR SEKELJ

Kiel multaj el vi jam scias, tio estas la interreta ŝelo de t.n. *Projekto Interkulturo*, lanĉita en 1998. Nun kelkdek lernejaĵoj aŭ grupoj el pluraj landoj aperas en tiu paĝaro kaj ekster ĝi lernas Esperanton kun interkultur-eduka celo (v. Charters IPR 97/2/p.1, La Torre 98/3/p.3, 99/3/p.7, Petrovic' 00/3/p.27, 00/4/p.22, 01/4/p.8, Ignatieva 01/3/p.8).

Kelkaj el ili kunlaboras inter si aŭ eĉ fizike renkontiĝas en iuj eŭropaj regionoj. La ideo montriĝis taŭga, sed ĝi ja bezonas plurdirektajn evoluigojn, kiujn ni estas tradukantaj en konkretajn projektojn:

- pli bona flegado de la korespondado de la klasoj kun la mastruma centro;
- rearanĝo de la komputilreta programaro, precipe por ebligi al la lernantoj mem enmeti materialojn kaj ŝanĝi siajn klasajn retpaĝojn;
- teknologia helpo al la klasoj, kiuj ne jam disponas pri kontentiga retaliro;
- publikigado de ia novaĵbulteno pri la Projekto IK;
- krome ni lanĉos pedagogi-sciencan esploron pri nia Interkultura edukosistemo.

2. KUNLABORADO KUN UNESKO

Kun tiu grandskala kaj malsimpla organizego, ni planas rilati divers-nivele:

- ni kampanjos ĉe Unesko-lernejoj de kelkaj elektitaj landoj, kie la loka movado kapablos inde "rikolti la fruktojn";
- ni proponos al la Landaj Sekcioj partopreni en la Unesko-programoj, kiaj "Manifesto 2000 - Por kulturo de paco kaj senperforto" (laŭ la ekzemplo de nia franca sekcio GEE);
- niaj oficialaj reprezentantoj ĉe monda Unesko (R. Triolle, J-P. Boulet, kaj M. Grosjean), kunlabore kun la reprezentantoj de UEA, rilatos kun la pintaj oficuloj kaj konferencoj (v. IPR Triolle 01/1/p.13).

3. ESPERANTO UNIVERSITATE

Ni estas aranĝantaj esploron pri la statuso de nia lingvo en la universitatnivelaĵoj instruoj, kaj aparte pri la interlingvikaj esploroj kaj disertaĵoj. Samtempe (aŭ poste) ni intencas evoluigi niajn rilatojn kun AIS kaj fakprofesiaj asocioj (v. IPR/01/1/p.1, Koutny 01/4/p.13).

4. EDUKADO.NET KAJ E@I

Edukado.net estas jam parte funkcia interreta medio, kiu celas liveri utilaĵojn por Esperanto-instruantoj. Ĝi estas subtenata de ESF (*Esperantic Study Foundation*), kun kiu ILEI estas traktanta por pli ĝenerala kunlaborado en la kampo de esperantologiaj scienc esploroj. La unua produkto de *Edukado.net* estas la lernolibra katalogo, rete konsultebla kaj komentebla (v. Fröhlich/Kováts IPR 01/3/p.2).

E@I estas serio da bonkvalitaj seminarioj, aranĝataj de TEJO, por trejni siajn anojn pri la aplikoj de Esperanto en la Reto, kaj male de retaj rimedoj en la Esperanta agado. Kun TEJO ekis kunlaborado en tiuj kampoj, kiun ni volas pliampleksigi ankaŭ al aliaj niaj projektoj, kiel la Kvazaŭna Lernejo "Sekel", aŭ la tele-trejnado de E-instruantoj [<http://www.ikso.net>].

5. CETERAĴOJ

Krom la menciitaj kvar plej grandaj projektoj, ILEI planas plurajn aliajn iniciatojn grandajn kaj malgrandajn, tujajn aŭ fortempajn, inter kiuj menciindas, ekzemple, la kunordigo de **E-instruprogramoj** kun la ekzamenaj sistemoj (naci- kaj internaci-skale), la kunlaborado kun TEJO pri **trejnado** de aktivuloj pri lingva instruado kaj interkultura edukado, kontribuado al la UEA-kampanjo *Savu esperantaĵojn* sur la tereno de dokumentado pri la **historio de Esperanto-lernado** kaj de **terminika esplorado** (v.ekz.: Horváth IPR/96/4 ĝis 97/2, La Torre 98/4/p.5).

KONKLUDE

Post tiom da proponaĵoj, pli aŭ malpli proksimaj je viaj intereso kaj kompetentoj, kion vi povos fari? Pripensu je kiu el niaj projektoj kaj reorganizaj planoj vi ŝatus kunlabori aŭ por kio vi povas trovi kunlaboremulojn, kaj mesaĝu al la estraro (aŭ al la specifa estrarano), por konigi vian emon aŭ pretecon. Aliflanke sciigu al nia redaktulo Jozefo Németh pri vialokaj atingoj aŭ malfacilaĵoj, kaj li volonte publikigos pri tio.

Mi deziras al vi ĉiuj kontentigan laboron kaj feliĉan novan jaron!

via prezidanto, Maŭro La Torre

Johano Negrete INSTRUADO DE ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO VENEZUELA SPERTO

prelego dum la 35-a Konferenco de ILEI en Lovran, 2001

ENKONDUKO

Bonan tagon al vi ĉiuj! Mi kontentas havi la bonŝancon paroli unuafoje en ĉi tiu forumo. Mi reprezentas mian landon Venezuelo. Konvenas ĉi tie emfazi, ke mi venis al tiu ĉi renkontiĝo ĉefe por lerni kaj se eblas kontribui. Pri profesio, mi devas sciigi vin, ke mi ne estas profesia instruisto pri modernaj lingvoj, sed instruisto pri alia universitata fako, nome filozofio. Tamen provizore mi ludas rolon de esperanto instruisto nur pro manko de veraj profesiaj diplomitaj intruistoj nialande.

ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO.

La prelega titolo tekstas jene: "Instruado de Esperanto en Universitatoj. Venezuelo Sperto". Tio povus ankaŭ signifi, ke mi devas paroli necese iom pri mia propa vivo, ĉar la ebleco gvidi kursojn en la universitato okazis pro hazardaj faktoj, kaj pro la bonŝanco, ke mia universitato en Karakaso, la *Universidad Central de Venezuela*, havas fakon de Filozofio kun vere tre fleksebla akademika pensum, el kiu laŭvole oni povas selekti multajn kursojn, escepte de la baza deviga aro.

Mia esperantiĝo komenciĝis en la jaro 1992 en Hispanio dum mia unujara vizito al la Universitato de La Laguna, en mia naskiĝurbo La Laguna (Kanariaj Insuloj), konata urbo en Esperantio, ĉar tie laboregis la eminenta antaŭulo Juan Regulo Pérez. Dum ses monatoj mi studis tie aŭtodidakte la lingvon kaj revenis al Karakazo. La sekvan jaron, samjare de mia emeritiĝo en la Universidad Central de Venezuela, mi jam entuziasmiĝis pri la lingvo ĝis tiu grado, ke mi sentis la tenton prezenti programon de kurso pri Esperanto inter la listo de liberaj studobjektoj. Mi ne havis problemojn kun miaj fakuloj, malgraŭ tiu strangajo aŭ ekzotikajo kiel aperigi kurson pri la esperanta lingvo ene de programaro de filozofiaj

studobjektoj. Miaj kolegoj eble preferis, ke mi restu tie kiel profesoro pri logiko, kaj toleris min. Kaj tiel mi komencis en 1994 semestran elementan kurson pri la lingvo, 36-horan kurson nur por diskonigi ĝian logikan gramatikon. La kurso havis oficiale 2 kreditojn aŭ poentojn el tutaj de 150 inkluzivante la tezon.

Tia kurso ne estis ja la unua ofertita en tiu universitato. Ĉirkaŭ dudek jarojn antaŭe jam prof. Jorge Mosonyi (antropologo de tiu sama universitato) instruis Esperanton dum du semestroj en la Fakoj de Beletro kaj ankaŭ la fama hispana tradukisto Fernando De Diego faris same dum unu semestro. Dum ilia instruado la intereso unue altiĝis, la ekzotikaĵo kaptis kelkajn, sed ne sufiĉan nombron da lernantoj. Poste venis malpli da lernantoj kaj fine venis fermo de la oferto. Tiuj kolegoj vere estis la unuaj enkondukantoj de Esperanto en la venezuela universitato, kvankam mi ne scias kiamaniere ili ofertis kursojn aŭ estis permesataj.

Miakaze mi havis akcepteblan nombron da lernantoj: ĉirkaŭ 15. Do, kio sekvis? Dekomence mi ne malsukcesis. Du pliajn semestrojn mi ofertis Esperanton kaj profitis de la okazo por plibonigi mian instruadon kaj sperton. Tamen la intereso de studentoj malpliigis (6 lernantoj kaj en la sekvanta kurso 4). Mia filozofia fakoj havis tiam entute 560 studentojn. Do, propravele mi forlasis la eksperimenton, verdire iomete seniluziiginta, ĉar ĝi signifis multe da laboro sen taŭga akcepto.

Konsekvence, en alia universitato, la Katolika, mi ricevis en 1995 duontempan, novan, filozofian postenon. Mia devo: instruado kaj esplorado pri filozofio. Tamen la jam pikanta veneneto de Esperanto faris sian efektan. Miaj profesiaj interesoj iom post iom gvidis min al Esperanto. Mi daŭrigis kaj baldaŭ la lingvo okupis la centron. Senkonscie mi ŝanĝis al alia fakoj. Do, tuj mi prelegis pri E-o kaj gvidis, pro peto de studentoj, unu oficialan kurson ĉe la Fakoj de Modernaj Lingvoj en la Metropolitana Universitato. Nova kaj ĵusa fakestrino tie decidis kontentigi peton de gestudentoj, sed ŝi permesis aliĝi la kurson nur al veteranaj studentoj. Tie mi gvidis 3-horan kurson dum kvar monatoj kun 29 partoprenantoj. Ĝi valoris 3 poentojn. Unuafoje mi uzis la filmon Mazi en Gondolando, kiun la gelernantoj multege ŝatis. Tiu kurso estis taksata kiel sukceso, eĉ kun raporto en la esperanta gazetaroj. Tamen la fakestrino ne apogis plue la novan kaj ekzotikan studobjekton.

Mia portempa filozofia posteno ĉesis kaj mi iris al Instituto Pedagogico de Caracas, de la Pedagogia Universitato, por oferti tie kurson pri Esperanto, kiujn mi gvidis dum du semestroj, kun malmultaj gelernantoj, sed almenaŭ sufiĉe por gvidi ilin (12 kaj 7). Bedaŭrinde tiuj kursoj ne ricevas formalajn poentojn ĉar la strukturo de la edukadsistemo tie estas pli rigida. Pro ĝi ne eblas enkonduki formale rekonitan kurson, sed nur oferti ilin ekstersisteme. Tamen mi sukcesis tie elirigi bultenon pri Esperanto hispanlingve, kiun mi mem redaktas, nomita **Lingvo & Internacia Komunikado**. La bulteno enhavas ankaŭ dufolian kurseton pri Esperanto.

[Surfote: *Johano Negrete (dekstre) kun Radojica Petrović en Lovran*]



Poste mi preparis iun malneton pri katedro de Esperanto kaj rilata agado. Mi kredas ke ekzistas por tiu ideo ĉi-momente, ĉi-jare, pli granda bonŝanco en la Universidad Central de Venezuelo, Fakoj de Humanismaj Studoj, ol en la sama Instituto Pedagogico. Pro tio, mi jam redaktis antaŭprojekton de katedro de Esperanto, sed ankoraŭ mi bezonas la helpon de kolegoj. Laŭ mia kalkulo la projekto povus esti prezentata komence de la jaro 2002. La kontaktoj kun gravuloj de la universitato nun garantias iun eblecon, ke almenaŭ signifa parto de unu projekto estu akceptata.

Dum tiu jaro 1995 nur mi povis instrui Esperanton en Karakaso. Ĉar tiam nia Asocio ne havis taŭgan lokon por instrui dumsemajne. Sed intertempe Prof. Mosonyi planis alian universitan kurson en la Fako de Modernaj Lingvoj de la sama Universidad Central. Li ofertis unujaran kurson (1995-96), kvankam alvenis malmultaj lernantoj: ne pli ol 5. En ĉi-lasta lernejo, studentoj diplomiĝas en du lingvoj el inter la angla, franca, itala, rusa, germana kaj portugala. Tamen tiu profesoro sukcesis gvidi la unuan tezon pri Esperanto kaj movado por profesia diplomiĝo (bakalaŭro) en la Fako de Socia Komunikado. Ĝin verkis du junaj studentinoj kun la titolo: *El Esperanto: Alternativa dentro del proceso de globalización cultural* (El Esperanto: Alternativo ene de la procezo de kultura tutmondiĝo).

En dudeko da jaroj la resumo de nia aktivado en la venezuelaj universitatoj estas la jena: entute 12 kursoj en 4 universitatoj:

Universidad Central de Venezuela 7 (4 de aliaj instruistoj kaj 3 de J.N.)

Universidad Metropolitana 1 (J.N.)

Universidad Pedagógica 3 (J.N.)

Universidad del Zulia 1

Tio signifas, ke en Venezuelo ni devas persisti kaj repersisti, ĉar kurso de Esperanto je universitata nivelo jam ne ŝajnas esti strangajo.

RIMARKOJ KAJ PROBLEMOJ

Miaopinie la instruado de Esperanto en universitato havas kelkajn proprajn karakterojn, kiujn ni devas rimarki ĉi tie. Pri tio jam parolis kaj parolos profesorino Irina Gončarova. Tamen mi havas laŭ mia sperto la jenajn, specifajn rimarkojn rilate al la venezuelaj universitatoj:

1) Nestabila akademia agado afektas la intereson kaj bonan rezulton de ĉiuj kursoj.

Efektive, gravas ke mi menciu tiujn kondiĉojn de nestabileco kaj en horoj de klasoj kaj en programoj plenumigitaj. La Universidad Central de Venezuela estas la ĉefa kaj plej grava de la lando: 60.000 studentoj. La politika situacio dum la lastaj 45 jaroj afektis la stabilecon de la akademia agado. Oftaj strikoj de profesoroj unufoje, aŭ de laboristoj aliffoje, aŭ de studentoj aliffoje. Oftaj manifestacioj okazis

kune kun gasigado kaj polica perforto kontraŭ ili tiel, ke dum tiuj almenaŭ iu studento mortis aŭ estis pafvundata. Tiu sceno fariĝis preskaŭ kutimo dum dekoj da jaroj kaj tio influis la normalan disvolviĝon de la akademia agado. Tamen nuntempe en la lastaj 5 jaroj la situacio multe pliboniĝis rilate al la perforto kaj tendencas stabiligi normalan universitatan vivon.

2) Kiel respondas universitataj studentoj al Esperanto?

Normale ĉiu studento devas kolekti 150 poentojn por atingi la unuan gradon de profesia diplomiĝo. Oni devas suspekti ke rilate al Esperanto, iliaj interesoj estas ĉefe akumuli poentojn, ju pli facile des pli bone, por fini la studon. Do, aparte de kuriozajo pri la temo de Esperanto, ne ekzistas ankoraŭ forta impeto al la lernado de la lingvo por si mem. Ĉiuokaze, ni instruistoj devas transformi la studentan iniciatemon en veran intereson por la lingvo kaj por la eblecoj kiujn ĝi prezentas al la homaro.

3) Kiel ili perceptas Esperanton: facila aŭ malfacila lingvo?

En la unuaj lecionoj sendube la lingvo aperas kiel facila al ĉiuj lernantoj. Tamen, kun la progreso en la gramatiko kaj vortfarado oni konstatas ke studentoj, kiuj ne multe ŝatas pensi aŭ cerbumi kaj preferas la aŭtomatecon kaj ripetadon en lingvolernado, la logikeco de Esperanto aperas kiel malfacileco, ĉar oni devas uzi la logikan deduktadon por diveni la signifon de novaj vortoj.

La tradicia kutimo en nacia lingvolernado estas akiri kapablojn per trejnado, ripetado kaj aŭtomateco. Ne per granda kaj konstanta uzo de la logiko. Tamen, logiko estas tipa karaktero de nia lingvo Esperanto, kaj ĝi aperas kiel duflanka medalo, kiu faras la lingvon facila kaj malfacila, kvankam en malsama senco. Estas facile progresi rapide en la lernado dum la unuaj lecionoj. Tamen poste la lingvo turniĝas iom tro peza pro troigo de deduktado aŭ sintezo en la vortfarado. Miaopinie oni ne devas troigi en la unuaj niveloj de kursoj nek la deduktadon nek la sintezon en la vortfarado, kaj aldone oni ne devas troigi la facilecon de la lingvo.

4) Informi pri Esperanto, vera problemo, sed ne de la lingvo-instruado.

Estas necese fari la informadon pri lingvoceloj, historio kaj movado, almenaŭ en malgradaj dozoj krom la lingvo instruado. Se oni

gvidas universitatan kurson, eble ne sufiĉas la horoj de klasoj por transdoni amason da konoj pri la historio, literaturo kaj movado. Je universitata nivelo studentoj estas multe pli postulemaj kaj ofte kritikemaj pri ideologiaj aspektoj de la monda lingva problemo. Do estas necese krei alian ilon de komunikado nacilingve (bulteneton aŭ flugfolion) por eksterkursaj informado.

UTILECO DE LA LINGVO POR SUPERA EDUKADO

Oni devas montri je universitata nivelo

- 1) ke la logikeco de la lingvo estas eduka faktoro en scienca pensado, ĉar ĝi kongruas plene kun la formala edukado pri sciencaj teorioj kaj esplorado;
- 2) ke la lingvo povas havi ampleksan aplikadon en sciencaj esplorado kaj komunikado. Oni jam povas konstati signifan kvanton de perreta komunikado rilate al sciencaj problemoj;
- 3) ke la lingvo mem estas sufiĉe fleksebla por ludi kaj stimuli la kreadon, ĉar oni ne bezonas multe da tempo por lasi la lingvan pasivecon. Male, oni baldaŭ turniĝas kreiva en la vort- kaj frazkonstruado.

FINAJ REKOMENDOJ

- 1) Informado per nacilingva publikajo por informi al la kursanoj kaj ĝenerale al la tuta universitata komunumo.
- 2) Oni devas penetri la universitaton. Eĉ se oficialigo de la instruado de la lingvo kun rekono kaj poentoj ne eblas, oni devas, do, enkonduki ĝin neformale. Poste oni vidos kio eblas por stabiligi kursojn kaj por oficialigo.
- 3) Katedro de Esperanto, ĉie kie eblas. Ĝi postulas grandan penon pri laboro, influadon en la universitata medio kaj organizadon. Nur kompetenta teamo povas akiri tiun nivelon. Almenaŭ du tri homoj sufiĉas. Katedro de Esperanto devas disvolviĝi en pluraj agadoj, ekzemple,

- Plurnivela kursaro

- Scienca esplorado pri lingvo kaj kulturo kun precizaj projektoj
- Informado pri graveco de tiu laboro pere de ekspozicioj, prelegoj, filmoj, kaj tiel plu
- Akiri financajn rimedojn, kiuj povas veni de privataj aŭ oficialaj organizoj
- Allogaj programoj de utiligo de Esperanto por monda komunikado. Ekzemple, pere de enketoj pri lingvaj problemoj, pri edukado de lingvoj aŭ pri interkultura edukado, aŭ konkretaj projektoj pri scienca kunlaboro internacie (pri matematiko, fiziko, antropologio, sociologio, ktp.), formulitaj laŭ universtataj reguloj.

Oni devas esti persistema, se oni intencas enkonduki Esperanton en la universitaton. Mi memoras nun ke la plena enkonduko de la astronomia teorio de Koperniko (kiel serioza teorio en universitata instruado) daŭris pli ol ducent jarojn.

Pro ĉio ĉi konvenas fine notigi pri la homa naturo la tri normalajn momentojn de reago rilate revoluciajn ideojn. Tio nomiĝas ŝerce-malŝerce la leĝo de Clarke, kiu tekstas jene

Unua momento: "Tio neblas. Do, ne perdu vian tempon"

Dua momento: "Tio eblas, sed ne valoras la penon"

Tria momento: "Mi ĉiam diris ke tio estas granda ideo"

Multajn dankojn pro via atento!

IPFELKOFER Jomo Komparo de instrumentoj

En majo 1998 estis publikigita internacia kompara studo pri matematiko kaj sciencoj: TIMSS (*Third International Mathematics and Science Study*). La analizado de tiu kompara studo ankoraŭ ne finiĝis. Tamen indas kaj interesas pripensi kaj pridiskuti rezultojn kaj konkludojn koncernajn. Mi mem povas serioze prijuĝi nur germanajn lernejojn. Volonte mi ekscios faktojn, opiniojn kaj memorajojn pri lecionoj, instruistoj, sukceso, ktp. en lernejoj alilandaj.

Evidentiĝis, ke gelernantoj en Japanio pli sukcese lernas kaj pli

kapablas ol usonaj kaj germanaj gelernantoj. Kial do? Kompreneble la rezultoj de TIMSS iel maltrankviligis kaj nervozigis la germanajn politikistojn respondecajn pri instruado, la gepatrojn ambiciajn kaj certajn ke ili transdonis nur plej bonkvalitajn genojn, kaj la geinstruistojn kiuj jam delonge plendas pri stulteco kaj maldiligento de la juna generacio, precipe en Germanio, kaj samtempe admiras iujn ege lernemajn kaj laboremajn japanojn, kvankam iom meditas kiel tiu malbona rezulto povis okazi malgraŭ bonegaj lecionoj. Ne tro maltrankviligis la TIMSS-rezultoj la gejunulojn, ĉar ili ne interesiĝas pri tiaj enuigaj lernejoj. Nur nervozigis ilin eble, ke kelkaj ministroj ordonis tuj aranĝi plian ekzamenon matematikan por kontroli, ĉu TIMSS pravis ...

Kelkaj seriozaj sciencistoj kaj instruistoj nun serĉas verajn kialojn kaj intertempe jam trovis plurajn eblajn.

En Japanio, kaj elementa lernejo (unua ĝis sesa klaso) kaj meza lernejo (sepa ĝis naŭa) estas komunaj, unuecaj, samaj por ĉiu lernanto. Ne okazas disdivido en grupojn laŭ sukceso, notoj, scipovo, talento ktp. Ne ekzistas deviga ripeto de klaso post malsukcesa jaro. En Germanio oni ĉiam denove selektas infanojn. Tio signifas ke lernantoj nesufiĉe sukcesaj, inteligentaj, diligentaj (rapidaj, obeemaj?) ktp. ne rajtas avanci



en sekvantan klason. Kaj post nur kvar jaroj de komuna lernado la plej sukcesaj infanoj rajtas transiri en gimnazion, en kelkaj federaciaj landoj ankaŭ en mezlernejon. En aliaj landoj tio okazas post la sesa klaso. Ĉiuj aliaj restas. Tamen oni ne nomas ilian lernejon „rest-lernejo”, sed „ĉef-lernejo” ...

Ĉu multope pli bone?

En Japanio sidas meznombre 37 gelernantoj en unu klaso, en Usono 27, en Germanio 24. Ĉu oni lernas des pli bone, ju pli da akompanantaj kunlernantoj apudas? Ĉu tial en universitataj aŭditorioj sidas centoj da studentoj?

La lecionoj en Japanio estas evidente aliaj ol en Germanio. La instrumaniero estas ilustra kaj vigla. La taskoj estas kvazaŭ enigmoj ekscitaj. La instruistoj ebligas al la lernantoj mem serĉi solvojn, prezenti provojn kaj strategiojn, kaj oni kompare pridiskutas diversajn rezultojn. Multan tempon oni uzas por prilabori malnetajn matematikajn konceptaĵojn kaj intensive kompari ilin. Kontraŭe, en Germanio ofte okazas lecionoj, dum kiuj instruisto gvidas la disvolviĝon aŭ ellaboriĝon de formulo, kaj poste devigas la gelernantojn parkere lerni kaj ekzerce apliki tiun formulon.

Kiel en tempo de Sokrato oni praktikas „majeŭtikon”, la arton de didakta akuŝistino. Kredante ke la kapabloj kaj scioj jam dormetas en la interno de infanoj kaj studentoj, oni klopodas ruze helpante ellogi ilin ... Fakte okazas io alia: instruisto, tre bone konanta la celon de la leciono kaj diligente preparinte la temon, demandas aŭ demonstras ion. Unuopaj lernantoj aŭ false respondas aŭ malkomprenas, kaj la instruisto mallaŭdas ilin kaj sin turnas al aliaj, ĝis iu lernanto ĝuste respondas. La instruisto laŭdas, ĝojas pri la sukceso kaj daŭrigas. La plimulto de la studentoj komprenas ne tro multe. Kaj ne malofte infanoj sentas ofendon, ĉar en unu leciono nur unu aŭ du fojojn estis ilia vico, ĉar la instruisto estis malkontenta pri la neatendita malĝusta respondo, aŭ ĉar li denove demandis tiun fian najbarinon. Kaj ĉiutage ili devas timi tiujn subitajn ekzamenetojn kaj pridemandadojn, per kiuj ili estas klasifikataj laŭ taksociferoj.

La sciencistoj eltrovis, ke en Japanio instruistoj konfrontigas lernantojn al altnivelaj realecaj problemoj. Tiujn ili prezentas plastike kaj vive. Unue oni intense pridiskutas la problemon kaj poste la lernantoj komencas praktike prilabori ĝin. Preskaŭ ĉiu problemo havas plurajn solvojn diversformajn aŭ diversvojjajn. Oni komparas, esploras, analizas,

pritaksas la solvojn, eĉ la maltaŭgajn oni akceptas. Ankaŭ eraraj solvoj povas esti interesaj kaj instruaj. Solvovoj estas pli gravaj ol rezultoj.

Mi donas ekzemplon: lu homo heredis kastelon kun granda parko kaj monsumon imponan. Li intencas okazigi grandan inaŭguran ĝardenfeston. Ĉar li mem havas nek tempon nek emon falĉi la park-gazonon, li serĉas per gazetanonco ĝardeniston. Li ricevas tri ofertojn: la unua ĝardenisto promesas falĉi la gazonon en ses horoj, la dua volas fari tion en kvar horoj, kaj la tria certas fini la laboron en tri horoj. Ĉar mono inundas, la nova kastelpatrono dungas ĉiujn tri. Kiom da tempo ili bezonos por falĉi la gazonon? Vere simpla kalkulo, kiam oni estas kondukata de instruisto kiu jam konas la solvon. Sed propravoje trovi solvon? Ĉu simpla? Provu mem!

Fermat

Interesan eldiron mi trovis en traktajo pri la konata *Lasta teoremo de Fermat*. Andrew Wiles diris ke „Taniyama ne estis tro skrupule ekzakta matematikisto. Li faris multajn erarojn, sed li eraris en bona direkto kaj fakte atingis ĝustajn rezultojn. Kaj mi provis imiti lin, sed mi eltrovis ke ege malfacilas fari taŭgajn erarojn.”

Kontraŭe, en Usono kaj en Germanio oni foruzas multan tempon pro ekzercado de rutinaj procedoj/kapabloj. En Japanio laŭraporte la lecionoj okazas en atmosfero de studado, ne de ekzamenado, klasifikado kaj selektado.

Krome, hejmtaskoj, libervolaj ekzercoj kaj privataj kromlecionoj en Japanio estas normalaj kaj pezas multe pli. Japanaj infanoj por tio meznombro elspezas en la unua klaso proksimume po 4 horojn

semajne (en Usono 1:10), en la kvina 4:20 ĝis 6 horojn (en Usono 2:20 ĝis 4:15). Por matematiko japanoj entute elspezas 7:30 horojn en unu semajno, same usonanoj, kaj germanoj 5:45 horojn. Japanaj gelernantoj, gepatroj kaj geinstruistoj opinias ĉiutagan ekzercadon kaj ripetadon nepre necesa. Gepatroj kaj pli aĝaj gefratoj intense subtenas, helpas kaj partoprenas la lernadon.

Jen eblaj kaŭzoj, kial japanaj gelernantoj en TIMSS-studo pli bone sukcesis ol usonaj kaj germanaj. Sed eblas ankaŭ aliaj kialoj. Eble la tuta sinteno, la disciplino, la aprezo de lerneja lernado, la pensmaniero, la



instruista sinteno rilate al infanoj kaj reciproke, aliaj detaloj aŭ io ajn influas la lernadon kaj ties efikon. La sciencistoj diras, ke tro homogenaj lernanto-grupoj ne bonas. En Germanio per ripeta selektado oni homogenigas lernanto-grupojn, klasojn, pecojn de lernejoj. Mi volonte ekscius pli pri subjektivaj aŭ sciencaj spertoj de tiu fenomeno.

(Aperis en *Monato*, junio 2001)

la redaktanto de www.edukado.net kiuj estas la spertoj post la unua monato.

Jozefo Németh, la redaktoro de IPR intervjuas sian koleginon Katalin Kováts, kiu multe kontribuis al la enhavo de tiu poresperanta servo.

(Detalan priskribon pri la

projekto edukado.net vi trovas en IPR 01/3. p.2-5. kaj en la hejmpaĝo mem.)



J.N.: Unue akceptu mian gratulon kaj dankon, kiujn mi diru el la nomo de la legantaro de nia revuo. Ĉu vi kaj la teamo estas kontentaj?

K.K.: Multe pli gravas ke la publiko estu kontenta kaj ĉar tio montras siajn signojn, kompreneble ankaŭ ni estas feliĉaj. Kvankam pasis multaj tagoj kaj noktoj de post la lanĉo

de la paĝo, mia tago eĉ nun komenciĝas tiel, ke mi rigardas kaj notas kiom da personoj vizitis la paĝaron kaj kiuj kiajn mesaĝojn, rimarkojn lasis en la gastlibro aŭ ĉe la unuopaj lerniloj. Mi, kiel redaktanto, ankaŭ respondas mesaĝe al ĉiu kaj provas utiligi la ricevitajn proponojn.



J.N.: *Ĉu vi povus doni kelkajn ciferojn kaj konkretaĵojn?*

K.K.: Volonte. Ene de unu monato vizitis la paĝon preskaŭ 1100 personoj. En la gastlibro estas entute 71 enskriboj, el 25 landoj. kaj 22 apartaj opinioj legeblas ĉe 15 diversaj lerniloj de la katalogo. Krom tiuj publikaj enskriboj mi ricevis plurdekojn da mesaĝoj kun proponoj, sugestoj aŭ simplaj laŭdoj. Iom tristige estas ke ĝis nun nur du reagoj venis el Azio. Tute kompreneblas por mi ke la plej multaj venis el Hungario, krom la 6-8 vizit-enskriboj el Usono, Francio kaj Finnlando. En la katalogo troviĝas nun 60 lerniloj, 43 nur esperantaj, kaj 17 nacilingvaj, fakte uzeblaj por 26 diversaj nacioj.

J.N.: *Mi proponas citi ĉi tie kelkajn opiniojn.*

K.K.: Jen vere nur kelkaj por ke ni ne aspektu tro fanfaronaj.

"Mi tre ĝojas, ke tiel altkvalitan paĝon oni jam sukcesas funkciigi. La profesieco-nivelo de niaj laboroj devas daŭre plialtiĝi. La prizorgantoj de ĉi tiu paĝo rolis kiel modelo por multaj aliaj el ni"

(Probal Daŝgupto)

aŭ alia mesaĝo de Germana Esperanto Biblioteko, La afergvidanto, DE-73430 Aalen:

"Mi taksas tiun reteblecon tre taŭga kaj nur povas gratuli al la kunlaborantoj. Unu el la plej uzeblaj retpaĝoj en Esperantujo."

kaj multaj simile gratulaj. Krom tiuj tre utilas la mesaĝoj, kiuj sugestas ligi novajn retadresojn al la jam ekzistanta retkurso listo, starigas demandojn pri la funkciigo kaj aktualigo de la paĝaro, informiĝas pri la estontaj planoj en la ĉapitro pri la internaciaj ekzamenoj, aŭ iom kritike menciias ankoraŭ mankantajn librojn.

J.N.: *Kaj ĉu vi tuj povas agi kaj reagi al tiuj proponoj?*

K.K.: Se temas pri ligoj farendaj, en tiu kazo jes. Same respondi al la demandoj pri la planoj. Sed bedaŭrinde aldoni proponitan libron al la katalogo estas ne tiom facila tasko.

Parte ĉar la analizo de ili prenas tempon, parte ĉar mi devus havi tiujn lernilojn por povi komenti ilin. La katalogo pretiĝis plejparte laŭbaze de mia privata biblioteko, kaj kvankam mi aĉetis multajn librojn por tiu celo, nia familia buĝeto ne permesas tro da novaj elspezoj.

Estus tre bone, se eldonejoj, verkistoj povus sendi ekzempleron de siaj produktoj, kaj ankaŭ "privataj proponantoj" povus kontribue sendi aŭ almenaŭ prunti la libron kiun ili ŝatus enmetigi en la katalogon. Tiel ĝi fariĝus vera komuna trezorejo. Bonŝance venas kelkfoje ankaŭ tiaj proponoj.

N.J.: *Krom la katalogo, retkursoj kaj ekzamena partoj (kiujn vi daŭre planas riĉigi), kiuj estas sekvapaŝe la fokusitaj partoj de la projekto?*

K.K. Unue ni planas fari kelkajn ŝanĝojn por pli faciligi la uzon de la paĝaro.

Poste la plej granda defio por mi estos la kreado de la lerniloteke. Plej verŝajne ĝi estos tiu parto, kiun la instruantaj kolegoj pleje ŝatos kaj bezonos, sed por kiu vere necesos granda internacia kunlaboro.

N.J.: *Ĉu vi resumus pri kio temas?*

K.K.: Tiu parto estas iu datumbanko de ekzercoj, tekstoj kaj testoj al kiu ĉiu povas sendi siajn materialojn, kaj el kiu oni povas elsuĉi la necesajojn.

Mia unua tasko estas difini en kiuj temoj kaj kategorioj ni komencas kolekti materialojn, kiuj ekzercotipoj apartenu al la lerniloteke, kaj tiel priskribi la formaton kaj kriteriojn, ke la kolegoj povu sendi tiajn dokumentojn, kiuj bezonus poste la plej malgrandan tralaboradon kaj adaptigon al la sistemo. Unue necesas ellabori modelojn, por kio mi uzos mian ĝisnunan propran kolekton kaj niaj teknikistoj klopodos doni la tutejan kostumon por la enhavo.

Krom tiu parto ni planas funkciigi ankaŭ la aliajn jam indikitajn rubrikojn, la forumon kaj ankaŭ la diskutejon por rektaj informŝanĝoj.

N.J.: *Kiam la publiko povos vidi la rezulton de tiu nova fazo?*

K.K.: Ĝenerale ekde marto ĉiam videblos ŝanĝoj, do valoros regule viziti la paĝon, kaj espereble ankoraŭ printempe ekfunkcios la lerniloteke kies kreskoritmo dependos ĉefe de niaj kolegoj.

N.J.: *Ni esperu ke la Esperanto-instruistoj ne nur uzi volas la servon de edukado.net, sed ankaŭ volonte kontribuos al ĝi. Ni finu la babiladon per*

iom persona demando: kial vi estas tiom entuziasma por tiu laboro, kio donas tiun energion al vi?

K.K.: Vi bone vidas, la paĝo fariĝis mia “kor-afero”, ĉar mi opinias ĝin utila kaj ĉar mi trovis iun manieron ene de ĝi helpi al kolegoj kaj lernantoj en ilia instru- kaj lernoprocesoj. Estas kion mi ankaŭ ĝis nun faris kadre de miaj metodikaj kursoj. Sed la plej gravan energion kaj entuziasmon donas parte la fido kaj subteno de ESF, kiu en januaro pozitive decidis pri la plua subteno de la projekto. Aliflanke tiuj eksterordinare aktivaj kaj entuziasmaj junuloj, kiuj estas miaj kolegoj en tiu projekto, sen kies fakaj konoj pri programado, helpo kaj ĉiama preteco simple la tuta afero devintus esti pura revo. Ni ĉiuj devas esti dankemaj al ili. Mi certe estas!

Fiedler – Liu (red.): Studoj pri interlingvistiko (recenzo)

Festolibro por Detlev Blanke

Studoj pri Interlingvistiko – Studien zur Interlinguistik – Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Redaktintoj: Sabine Fiedler kaj Liu Haitao. Korektintoj, tehniko helpintoj: Mark Fettes, Ino Kolbe, Wera Blanke, Dieter Dungert, Rainer Fiedler. Eldonloko: Dobrodovice¹. Eldonejo: KAVA – PECH. Amplekso (kun indekso): 736 paĝoj. Internacia identiga numero: ISBN 80-85853-53-1.



Ĉefaj partoj: *Enkonduko*, listo de la 140 gratulintoj (*Tabula gratulatoria*), I. *Lingvoplanado kaj lingvopolitiko*, II. *Studoj pri teoriaj, historiaj kaj pliaj aspektoj de interlingvistiko*, III. *Esperantologio*. IV. *Terminologisciencaj kaj leksikografiaj aspektoj* – Biografietoj de la kontribuintoj – *Publicaĵoj de Detlev Blanke kun redaktofino 31/12/2000*, kun pli ol 500 titoloj elektitaj el la efektive aperintaj ĉ. 1600.

¹ Ĉe Prago.

[...] ² La *Enkonduko* prezentas el 60 vivojaroj de Detlev Blanke (naskita 30.05.1941) tiujn pasigitajn kun Esperanto. 1964: interlingvistika seminario en la universitato de Rostock, 1968-90: Sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, 1988: Honoraria Docento pri Interlingvistiko. 1990: unuigo de GDRA kaj GEA. 1977/78: Honoraria Docento pri Interlingvistiko. Societo pri interlingvistiko 1991: Eminentaj sukcesoj en scienca kaj sciencorganiza agado – kontinue.

I. Lingvoplanado kaj lingvopolitiko

Kimura Goro C. (en sia *Intentionale Eingriffe in den Sprachgebrauch*, 19-29), asertas, ke lingvomovadoj, kiuj provas influ lingvo-uzon, estas nur parto de la intenca rilatado al lingvoj. Estas grave kompari kaj analizi la alirojn de parolhigieno kaj lingvo-manaĝado. [...]

Ignat F. Bociort: (en *Artefarita kaj natura konceptoj en la evoluigo de la rumana lingvo dum la 19-a jarcento: Skizo de historia trarigardo*, 30-35) esploras la forte diferencajn lingvorenovigajn tendencojn en la historio de la Rumana lingvo. La bezonon riĉigi la lingvon oni konsciis jam en la 16a, 17a jarcentoj. Rimarkindas provoj malpliigi la proporciojn de slavaj vortoj en la vortostoko, plimultiigi la elementojn komunajn kun la Latina, Itala, Franca lingvoj. En la 19a jarcento tamen venkis la natura koncepto: ĉe tio havis gravan rolon dramverkisto-prozisto V. Alicsandri. Iom post iom oni venis al unuece latina alfabeto kaj fonologia principo de ortografio,

Johannes Irmischer prezentas historion de versioj de la lingvo Greka – tiel ankaŭ diversepokajn realiĝojn aŭ provojn de ĝia uzo kiel interlingvo por pli aŭ malpli vasta areo. (En *Griechisch als internationale Sprache*, 36-39). [...]

Christer Kiselman prezentas nociojn de lingvoplanado – distingante statusan, korpusan kaj akiran planadojn, t. e. planadon de la konsisto de la lingvo, de ĝia agnosko kaj de ĝia alproprigo, instruado, lernado. (*La sveda faklingvo en tekniko, matematiko kaj natursciencoj*, 40-56). [...]

Werner Bormann (en sia *Verschiebungen im Machtgefüge*, 57-69), akceptas kiel fakton ke la lingvo Angla – post 1989 – estas la unuaranga interlingvo de la mondo, kvankam ĝia parolantaro laŭ nivelo de la lingvokono estas tre malhomogena. (*English ist die Weltsprache de facto*). La demando restas: kiel al tio povas rilati esperantistoj, kun sia speciala, konkurenca ideo pri internacia lingvo? [...]

² NdIR: La originala recenzo estis pli longa. Pro spacaj kialoj ĝi estas mallongigita. La koncernajn lokojn ni markis per [...]. La tuta teksto de la recenzo troviĝas ĉe www.nl-papa.hu/ipr kaj tiu de la libro estas ĉe <http://www.esperantic.org/librejo/dbstudoj/>

Al **Hans Erasmus**, (laŭ lia *Das Sprachenproblem in Europa*, 70-76) malplaĉas, ke oni kvazaŭ konfidas la solviĝon de la evidentaj Eŭropaj lingvoproblemoj al fortoj kaj okazoj spontaneaj. Li preferus proceduron kun interagado. [...]

Max Hans-Jürgen Mattusch³ (en *Globalisierung und europäischer Fremdsprachenunterricht*, 77-94) trarigardas la staton de instruado kaj regado de fremdaj lingvoj en Eŭropo, kun statistikoj. Li prezentas resume kvin eblojn por solvi la nunan lingvoproblemon. 1) solvo per plurlingveco (kompren-instrua) 2) tutmonda establigo ekzemple de la lingvo Angla kiel frankumo⁴ 3) Uzo de teĥnika rimedo ekz. aŭtomata tradukado 4) uzo de planlingvo (krom la gepatra lingvo) 5) vasta uzo de planlingvo kaj uzo de la lingvo Angla en scienco. Mattush opinias, ke Esperanto estas imagebla (jam) nun, kiel 12a lingvo de Eŭropa Unio, eĉ – oni povus ĝin apliki kiel tradukistan interlingvon (similan rekomendon havis laste P. Rados en Hungario). – La aŭtoro atentigas, ke la grandaj kulturtrondoj havas ankaŭ siajn zonajn (kernajn) lingvojn.

Renato Corsetti, en sia artikolo (*Homaj rajtoj, lingvaj homaj rajtoj kaj Esperanto*, 95-106) sugestas, ke esperantistoj dekomence respektis kaj favoris lingvajn rajtojn ankaŭ de lingvaj minoritatoj, kaj ke esperantistoj emas kunlabori kun organizoj kiuj konsente respektas homajn rajtojn.

Corsetti referencas al gravaj E-tekstoj, kiuj liajn asertojn montras ĝuste motivitaj almenaŭ pri la tendenca aliro de esperantistoj. Li citas Ludovikon Lazon Zamenhof: “en niaj kunvenoj ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiitaj... ni ĉiuj estas egalrajtaj”. Li citas el 1954 deklaron pri la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiu engaĝas sin “antaŭenigi kaj stimuli la respekton al homaj rajtoj kaj al fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso aŭ religio”, kaj deklaron de UEA el 1947, laŭ kiu “la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo”. Aliflanke li klare demonstras, ke pro ofta neglekto de homrajtoj en la plimulto de la landoj kvazaŭ ne eblas tute ne kunlabori kun landoj havantaj mankojn tiukampe. Corsetti skribas: “Ŝajnas al mi ke, krom preteksto por komitataj debatoj de tempo al tempo, neniam UEA rifuzis kunlabori kun esperantistoj en landoj, kie klare parto de la homaj rajtoj ne estas respektata. Do la deklaro estis principa deklaro, ankaŭ ĉar ne povis okazi io alia. Asocio, kiu volus kunlabori nur kun landoj, kiuj aplikas la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, tre malverŝajne trovus landon eĉ por sia sidejo.” “Alia afero estas, ke en landoj, kie homaj rajtoj estis serioze malrespektataj, Esperanto-movado ne prosperis” – Por demonstro de la kontraŭdira situacio Corsetti interalie rememorigas, ke UN en 1998 akceptis 52 Universalajn

³ La aŭtoro (interalie) de la libro *Vielsprachigkeit: Fluch oder Segen für die Menschheit*.

⁴ En la artikolo *lingua franca*, la vorto *frankumo* estas mia rekomendaĵo surbaze de la Fundamenta funkcio de —um—

Konvenciojn pri Homaj Rajtoj, el kiuj Norvegujo ratifis 46 (maksimumo), Italujo – 39, Somalujo kaj Usono – po 15, Eritreo 2, kaj la lando la lando Niuo –1 (mia elekto el 26 ekzemploj de Corsetti). La aŭtoro rememorigas pri punktoj de la Manifesto de Prago (1996), kiuj kongruas kun la principoj de prilingva demokratio, kaj klarigas, ke UEA nun puŝas aliajn neregistarajn organizojn de UN en simila direkto. En 1999, en Seulo la Konferenco de Neregistaraj Organizoj de UN rekomendis ke La Ekonomia kaj Sociala Konsilio de UN 1) fiksi proksiman daton por renkontiĝo kun trakto de la temo de Lingvo kaj homaj rajtoj en sia agoplano 2) ke tiu renkontiĝo konsideru la eblon de uzo kaj praktikado de internacia helplingvo. “Certe neniam la batalo por tutmonda justeco en la lingva-kultura kampo estis pli stimula ol nin” – finas sian artikolon Renato Corsetti.


II. Studoj pri teoriaj, historiaj kaj pliaj aspektoj de interlingvistiko

Aleksandr D. Duliĉenko (en sia *Planlingvo: inter lingvo-konstruo kaj etna lingvo*. 109-115) laŭ grado de homa interveno kaj laŭ rilato al socio, starigas, distingas, uzas parencajn, sed ne identajn interlingvistikajn kategoriojn kiel lingvokonstruo (LK), lingvoprojekto, planlingvo (PL), ensociiĝinta planlingvo (SPL), internacia artefarita lingvo (IAL) kaj etna lingvo (RL). Ensociiĝintaj planlingvoj (kontraste al milo da lingvoprojektoj) estas nur dek: Volapuko, Esperanto, Idiom Neutral, Latino sine flexione, Ido, Occidental-Interlingue, Novial, Basic English, Neo Interlingua. El la dek SoPloj⁵ funkcias plu kvar: Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua. [...]

Laŭ **Sergej N. Kuznecov** (*Interlingvistiko en “kosma dimensio”, vojaĝo inter kosmoglotiko kaj kosmolingvistiko*, 116-46), ĉar kosmo havas la signifon *mondo* (tergloba aŭ universa), la elemento *kosmo* rolas en nomo de pluraj planlingvoj (Kosmos 1888, Kosmolingvia 1927, Kosmolinguo 1956 ks.) inter ili ankaŭ de planlingvoj por interplaneda komunikado. [...]

Liu Haitao, en sia: *Informadika aspekto de interlingvistiko* (147-71) prezentas modelojn de internacia komunikado. Versioj: a) du partneroj (A, B) sen komuna lingvo, b) A

⁵ Duliĉenko uzas la mallongigon SPL (kaj aliajn: PL, IAL, LK, ELL, PD, komparu ĉe Melnikov IPL). Mi enlasis vokalojn por faciligi prononcon kaj distingon.



konas la lingvon de B aŭ inverse, C) A kaj B konas siajn lingvojn reciproke c) A kaj B havas komunan trian lingvon – rekomendinde. Liu Haitao pritraktas entropion en la uzo de literoj, surbaze de atingoj de Otto Haszpra, kaj Gledhil. La aŭtoro prezentas diversajn atingojn kaj eblojn de komputlingvistiko ĝenerale kaj koncerne Esperanton. – Liu Haitao, kun Sabine Fiedler, plenumis tre grandan laboron ankaŭ por rapide kaj sukcese redakti la tutan libron.

Klaus Schubert (en *Optimumigo de la internacia komunikado: interlingvistika rigardo al la nova industria lingvokonstruado. 172-83*) interalie prezentas ideojn pri interlingvo por maŝina tradukado kaj pli novajn laborojn por aŭtomate interpreteblaj lingvoj en evoluigado de softvaroj. Li prezentas informojn pri la lingvo Attempto Controlled English, de la universitato de Zuriko (Fuchs/Schwerwyl/ Schwitter), kies tekstoj estas legeblaj kaj por homoj, kaj por programoj.

Probal Dashgupto verkis pri *La metaliteraturo* (184-93). Centra koncepto de Probal Dashgupto estas gastigemo, kiu en ni devas helpi integriĝon de diversaj aliroj de ekkonado kaj de personaj apartenoj. La pensoj de Dashgupta esperigas onin pri sintezo super la nunaj streĉoj ene de la esperantistaro. [...]

Meta-elementoj en lingvouzo kaj literaturo Esperantaj tre konkrete estas prezentataj en la nepre leginda studo de la libron kunredaktinta Sabine Fiedler *Die B/blanke Wissenschaft – Luda komunikado en Esperanto*.

Ligiĝas teme ankaŭ la grava eseo de Aleksandro S. Melnikov *Pri la estetika funkcio de Esperanto*.

En sia “*Esenco kaj estonteco*” – jubilea rerigardo (194-202) – Mark Fettes analizas la klasikan eseon de Zamenhof. Fettes trovas en tiu Zamenhofaĵo kompreneblajn troigojn kaj pligrave, troigadon precipe de la teknika aspekto de la lingvoproblemo (bezono de komunikado, facileco de Esperanto). [...]

Vera Barandovska-Frank skribas pri *Forgesita planslavisma volapukisto* (203-216): “Václav Plocek naskiĝis en 1839, oficiro, li parolis kelkajn lingvojn..., li ellernis Volapukon kaj iĝis ties diplomita instruisto” – konstatas Barandovská. “Kvankam la oficiala lingvo en la aŭstro-hungara monarĥio estis la germana – ŝi klarigas – la ĉefoj konsciiĝis meze de la 19-a jarcento, ne nur pri sia propra nacieco, sed ankaŭ pri parenceco de ĉiuj slavoj.” (p. 206). Plocek estis samtempe volapukisto kaj entuziasma flama adepto de la nacia lingvo ĉeĥa, kion montras ekzemple liaj elektoj traduki en volapukon kaj liaj manieroj krei gramatikajn terminojn en la ĉeĥa, tradukante volapukan gramatikon.

Árpád Rátkai, en *Ido en Hungario* (217-43) kiel ankaŭ alifoje traktas movadojn de tiu aŭ alia planlingvo ne kiel disajn kaj sendependajn inter si, sed kiel partojn de la ampleksa internaci-lingva movado kun etapoj de Volapuko (1879), Esperanto (1887) kaj Ido (1908) ofte kun partopreno de identaj personoj. (Vd. ankaŭ Ulrich Lins, pri Oka Asajiro, samvolume). [...]

Ulrich Lins, en sia artikolo *Oka Asajiro, ein japanischer Kosmopolit* (244-53) prezentas la lernojarojn, studadon kaj agadon de Oka Asajiro, analizas lian lingvoprojekton Zilengo, liajn rilatojn al aliaj planlingvoj kaj planlingvanoj (Volapuko, Ido, Esperanto, Idiom Neutral). [...]

Estas tre aktuala la temo de Ulrich Becker: *Interlinguistik und Internet* (254-77). – La indikoriĉan tekston nepre devas vi mem legi.

Katalin Smidéliusz en *Interlingvistiko vivproksime* (278-291) prezentas sian Sombathej-an⁶ porstudentan lingvistik-aplikan seminarion, pri kiu vi povis legi ankaŭ en IPedRo⁷ (99/2: 12–19) aŭ en la Hungara revuo *Modern Nyelvoktatás: Gestudentoj projektas lingvojn, por pli kompreni la esencon kaj la problemojn*.

Cornelia Mannewitz – en sia *Spracherfindung in russischer Science-Fiction-Literatur* (292-304) – okupiĝas pri lingvaj inventoj en la rusa sciencfikcia literaturo.

III. Esperantologio

Humphrey Tonkin (*Esperantologio eksogena kan endogena*, 307-325) surbaze de konsiderinda parto de la priesperanta fakliteraturo komparas sciencajn prezentojn de Esperanto elinternajn kaj eleksterajn. Li emfazas, ke esperantistoj havas nun bonajn fakulojn, kiuj peras inter du medioj (temas pri Detlev Blanke, John Wells, Marc van Oostendorp kaj aliaj), sed - kontraste al la stato pli frua – jam ankaŭ la eksterula lingvistiko estas pli kaj pli preta observi kaj analizi – La tuto de la artikolo estas kvazaŭ pritakso de la momenta stato de la esplorado de Esperanto, kun utila bibliografio.

Daniele Vitali en sia klare ellaborita studo (*La nazaloj de la Internacia Lingvo*, 326-45) diras interalie, ke la esperantaj nazaloj, fonemnivele, estas du: *n* kaj *m*, ke *n* povas esti kunartikulaciata kun *j*, sed ĝi povas havi tian alofonon nur en la pozicio de la fonemo *n*, kaj ne en la pozicio de *j* – la nombro de la fonemoj en la vorto *panjo* estas kvin, kaj ĝi ne povas reduktiĝi je kvar. – El la fonemoj *n* kaj *m* havu lipodentan variaĵon – rekomendas Vitali – nur *n*: ni prononcu kun lipdenta *n* (tute malstreĉe kaj trankvile) la vorton *infano*, aliflanke en la vorto *amforo* ni (pli zorge) elparolu dulipan *m*. [...]

Constantin Dominte en siaj *Fonemstatistikaj rimarkoj pri Esperanto* (337-45) prilaboras 12 tekstojn kun po 300 literoj (t.e. kun sume 3600 literoj). La sinsekvo de la fonemoj laŭ ofteco: *a, o, i, e, n, l, r, s, t, k, d, j, u, m, p, b, v, f, ĝ, g*,

⁶ Laŭ Hungara skribmaniero: Szombathely.

⁷ IPedRo: Internacia Pedagogia Revuo. IPedRo estas mallongigo akcentebla kaj deklinaciebla.

c, ĉ, ŭ, ŝ, z, h, ĵ, ĥ. Laŭ la relativa ofteco de vokaloj inter dek sep lingvoj Esperanto estas la 12a, inter la Franca kaj la Hungara.

Ottó Haszpra en *Liter-ofteco en Esperantaj tekstoj* (337-45) ekzamenas 25 korpusojn kun sume 496 196 literoj. Se literojn kaj fonemojn ni kvante identigas, oni povas kompari *lian* laŭoftecan sinsekvon de literoj kaj tiun de Dominte.

Dominte: a,o,i,e,n,l,r,s,t,k,d,j,u,m,p,b,v,f,ĝ,g,c,ĉ,ŭ,ŝ,z,h,j,ĥ.

Haszpra: a,i,e,o,n,l,r,s,t,k,u,m,d,p,j,v,g,b,f,c,z,h,ĝ,ĉ,ŭ,ŝ,j,ĥ. [...]

Geraldo Mattos en sia *Okazo de kazo*, (365-85) klarigas, kiel eblas instrui la uzon de kazoj sen la tradiciaj terminoj. La artikolo tamen prezentas ne nur tion, sed preskaŭ la tutan hierarĥion de lingvaj frazoj inter morfemo kaj memstara parto de teksto, kiu estas nomata ofte frazo kaj kiun li nomas propozicio.

Otto Prytz en *Karakterizo de la infinitivo ĝenerale kaj de la Esperanta ininitivo speciale* (386-394) klarigas la diferencojn de sintaksa funkciado de infinitivo, verbo, substantivo kaj subpropozicio. [...]

Erich-Dieter Krause en sia eseo *Asiatische Lexik im Esperanto* (395-406) atentigas, ke Esperanto nepre devas kontentige speguli ankaŭ la ekster-Eŭropan realon. Li komparas, kiel eŭropajoj kaj ne-Eŭropajoj en Esperanto lastatempe reflektiĝas.

Ronald Löttsch (*Ethnonyme und Staatsbürger-bezeichnungen im Deutschen, Russischen und Esperanto*, 407-419) argumentas por pli konsekvenca uzo de la sufikso -an- por esprimi civitanon de lando.

Otto Back (*Esperanto-Spuren im Occidental*, 420-32) pravas, apogante sin sur aro da ekzemploj, ke Occidental de Edgar Wahl en multaj konkretaj solvoj imitas Esperanton. [...]

Heidemary Salevsky meditas pri ebloj de tradukado: *Läuten die Abendglocken auch in Esperanto?* (*Zum Problem der Übersetzbarkeit mit Blick auf eine Plansprache*, 433-54).

Gerrit Berveling (en *Tradukado de bibliaj tekstoj, specife en Esperanto. Kelkaj personaj spertoj*, 455-66) dilemsente pripensas, ĉu indas, ĉu endas forpreni historiajn kromgustojn el la Biblio, kiuj formiĝis ja pro iamaj miskomprenoj.

Hans-Burkhard Dietterle prezentas, kiel Johannes Dietterle inter 1916 – 1932 gvidante la organizojn Rega Saksa Esperanto-Instituto laboris kaj kontribuis al “plivastigo kaj pliiintensigo de la scienca laboro por Esperanto”. (*Johannes Dietterle – Organisator der wissenschaftlichen Arbeit für Esperanto*, 467-86).

La eseo de **Fritz Wollenberg** (*Erfahrungen bei der Erforschung und Darstellung der Berliner Esperanto Geschichte*, 487-503) bone montras, ke la Esperanto-vivo estas ankaŭ parto de regionaj kulturoj kaj loka kultura vivo.

Zbigniew Galor (*Esperanto-movado: Ĉu perdita komunumo?* 504-523) emfaze atentigas, ke neniu el la ĝisnunaj aŭ nun kutimaj imagoj pri la esperantistaro estas kaj restas nepre valida, ankaŭ pro la fakto, ke la esperantistaro kaj ĝia rilato al Esperanto ankaŭ nun estas ŝanĝiĝanta.

Andy Künzli diskonigas la vivon kaj agadon de rimarkinda persono de la historio de Esperanto (*René de Saussure (1868-1943) – Tragika sed grava Esperantologo kaj interlingvisto el Svislando* (524-46).

Mi (**Wacha e.s.**⁸. Vaha) tuŝas en la volumo la rilaton inter la ideoj de Couturat kaj Saussure (*Antaŭ-Sosurumo. Fragmentoj el verkata studo pri René de Saussure*, 547-64), por pli kompreni, kial Wüster restis iom malkontenta.

Till-Dietrich Dahlenburg: (*Politika aktualeco en Esperanto-lernolibroj de orientgermanaj aŭtoroj* 565-84) konstatas, ke novaj lernolibroj temas pli abunde, ol tiuj antaŭ 1989, pri privata vivo.

Sabine Fiedler interalie klasifikas lingvajn ludojn (3.1.1. Ludado per propraj nomoj, 3.1.2. per frazeologiaj, 3.1.3. per mistranĉoj, 3.1.4.1. per inicialoj/mallongigoj, 3.1.5. Miscelaneoj). Ŝi opinias, ke “ludkrea lingvouzo estas karakterizaĵo de Esperanto-komunikado (*Die B/blanken Wissenschaft – Luda komunikado en Esperanto*, 585-602).

Aleksandr S. Melnikov: en sia *Pri la estetika funkcio de Esperanto* (603-627) substrekas, ke lingvo ĝenerale kaj ankaŭ internacia planlingvo estas “nek lingvoprojekto, nek fakto, sed procezo (ja ĝi konstante ŝanĝiĝas)”, tial por diri ion ajn pri lingvoj, oni devas esplori iliajn “staton kaj evoluon ... surbaze de ties tekstoj”. Li konstatas ankaŭ, ke ĉiu planlingvo ensociiĝinta, eĉ se diference de la intenco/opinio de la fondinto aŭ adeptoj, atingas gradon, kiun karakterizas literatura verkado. Vicigas la aŭtoro lingvajn rimedojn, kiuj tion pravas koncerne Esperanton.

IV. Terminologisciencaj kaj leksikografiaj aspektoj

Heinz Hoffmann, parte surbaze de negativaj spertoj, insiste rekomendas, ke elirbazo de terminologia laboro estu sistema internacia harmoniigo de nocioj: (*Ebloj de planlingvo koncerne interlingvajn nocio-diferencojn je ekzemplo de fervojfakaj terminoj* 631-38).

Boris D. Marinov/Karl-Hermann Simon/Ingward Ullrich/ Horst Weckerth en la artikolo *Pri la internacia lingva interkompreniĝo kadre de forsta fako* (639-651) diras, ke por komenci kreadon de terminaro oni povas elekti el kvar ĝenroj: *difino-vortaro, ekivalent-vortaro, sinonim-vortaro kaj kolokaci-vortaro*. Ĉe forsta fako oni decidis la eblojn kombini kaj fine verki *forstan leksikonon*. La aŭtoro liveras tre konvinkan priskribon de la organizaj principoj de la laboro.

⁸ e. s.: Esperanta skribo, esperantlingva skrib-versio

Ulrich Fellmann (*Grandaj nombroj en Esperanto*, 652-9) prezentas la malharmonian uzon de nombroj en diversaj lingvoj de Eŭropo kaj Ameriko kaj ankaŭ ene de Esperanto (*biliono – 1000 milionoj, miliardo ktp.*).

Iiona Koutny karakterizas la nunan staton de la evoluo de la esperanta vortostoko kaj alvokas al kreado de vortaroj surbaze de korpusoj. Per ekzemploj ŝi montras malstabilajn punktojn, hezitojn en la nuna Esperanta vortouzo: (*Defioj de moderna leksikografio por Esperanto*, 660-74).

Kiel en la *Enkonduko* estas emfazite, 43 artikoloj de aŭtoroj el 19 nacioj "spegulas la larĝan spektron de interdisciplinan aliron en la verkaro de la honorato kaj krome klarbilde montras la multfojan eĥon, kiun tiu verkaro atingis." Tre preciza formulo. Gratulon kaj dankon al Sabine Fiedler kaj Liu Haitao, gratulon kaj dankon ankaŭ al iliaj helpintoj kaj refojan gratulon al Detlev Blanke.

Blazio Vaha

El la landoj kaj sekcioj

Balkanaj landoj

E-instruaj iniciatoj en Balkanaj landoj

La projekto Interkulturo (IK) estis inspira por pluraj E-instruaj projektoj en **Rumanio, Jugoslavio, Bosnio** kaj **Albanio**. Ekzemple, en elementaj lernejoj en Biksado, Rumanio, kaj Zajeĉaro, Jugoslavio, fariĝis daŭraj E-instruaj centroj ligitaj al la ttt-lernejo "Tibor Sekelj" kaj aliaj esperantistaj aranĝoj. Biksadanoj partoprenis en IIK kaj partoprenas en "Eŭroludejo", specifa subprojekto de IK, kunlabore kun aliaj klasoj en Italio kaj Francio. Zajeĉaraj IK-anoj gajnas premiojn de fabelkonkurso. En Timiŝoaro, krom IK-klasoj, organiziĝis ankaŭ E-klaso de Euroscola. Junaj esperantistoj el Albanio ekpartoprenis AIS-studadon kaj interesiĝas pri TEJO-agado. Rimarkindas la kunlaboro de Bosniaj E-lernantoj kun amikoj el Francio. IK-klaso en Beograd produktis novajn aktivulojn de SerbEJO kaj TEJO kiuj, interalie, organizis Danuban Lingvan Festivalon kadre de DESKF-5, partoprenis en TEJO-seminarioj en Varno, Budapeŝto kaj Upsalo, kaj kunorganizis partoprenon de esperantistoj kun E-kurso en la Tria Eŭropa Junulara Festivalo en Ankaro, Turkio, decembro 2001.

La internacia seminario Interkulturo en Ĉaĉak, Jugoslavio, kunlaborigis neesperantistajn organizaĵojn kaj instituciojn kiuj transprenis plejan

parton de organizlaboroj pri la Balkana Lingva Festivalo okazinta en oktobro 2001, post kiu kelkaj privataj lernejoj de lingvoj (ĉefe sed ne nur la angla) kaj la ŝtata Gimnazio en Ĉaĉak ekinteresiĝis pri daŭra E-instruado por siaj lernantoj.

Nova IK-klaso, aliĝinta komence de 2002, venas el Polski Trambesh, Bulgario, kun ambicio organizi internacian infanan E-renkontiĝon.

La Balkana Komisiono de UEA daŭre traktas Interkulturon en siaj agadplano kaj iniciatoj, kiujn karakterizas klopodoj al sinergiigo de agado de UEA, TEJO kaj ILEI en ĉi tiu mondoparto surbaze de la gvidlinioj de Strategia plano de UEA.

La aktualaj ĉi-regionaj ĉefiniciatoj estas:

- Balkana E@I: seminario pri kunlaboro per interreto, organizota kunlabore kun TEJO, E@I-fondajxo kaj subvenciantoj ekster Esperantujo, ĉefe traktanta interretajn E-kursojn kaj pluevoluigon de IK per interreto
- Seminario "Lingvo de komunikado, komunikado de lingvoj" organizota kunlabore de TEJO kaj GSM (turka junulara organizo), kun E-instruaj kaj porinstruistaj kursoj inter la programeroj.
- Infana E-renkontiĝo.

Por subteni tiujn kaj similajn iniciatojn, UEA malfermis apartan konton de Balkana Komisiono de UEA, al kiu helpemaj esperantistoj kaj institucioj povas enpagi sian monan kontribuon.

Radojica Petroviĉ, <radp@ptt.yu>

Finnlando

Al **Euroscola-en-Esperanto**, pere de sekciestrino de la E-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, anonciĝis grupeto el Raŭmo, kiu nun diligente progresas en E-o. Pro la eŭropa lingvotago kaj Jaro de lingvoj (2001) okazis ne malmultaj reprezentadoj de E-o kaj aliaj lingvoj en finnaj lernejoj kaj universitatoj. La lingva diverseco daŭre mirigas. Ekzemple en Tampere, la kongresurbo en 1995, la enmigrintaro havanta 16 gepatrajn lingvojn bezonas instruadon en la albana (12), araba (32), armena (7), bosnia (8), bulgara (11), hispana (14), ĉina (12), greka (13), kurda (28), paŝtua (5, el Pakistano), persa (farsa, daria 34), somala (24), taja (10, Tajlando), turka (9), rusa (155), vjetnama (40).

Raita Pyhälä

Hispanio

Instruisto serĉata

Estas bezonata instruisto, kiu instruos Esperanton kaj la hispanan lingvon, dum unu semajno (lasta semajno de junio 2002). La instruado okazos ĉiutage (ses tagojn), po du horoj entute, por grupo de eksterlandanoj kiuj okaze de la SAT-kongreso venos al Valencia.

La instruisto ricevos por tiu semajno loĝadon kun tri manĝoj tage, en junulara restadejo, tre bela kaj bone ekipita, situanta ĉe la plaĝo de la bela turisma urbo Benicassim (apud Castellón), kaj ĉirkaŭ 30.000 pesetojn.

Interesiĝantoj kontaktu A. Casquero: augustocasquero@infonegocio.com

Por via notlibro

Juna Amiko



INTERNACIA E-REVUO DE ILEI
POR
LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

- aĝas 29 jarojn;
- aperas 4-foje jare (marto, junio, septembro, decembro) sur 28 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50 procentoj!

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj. Karakterizas ĝin:

- *modela stilo kaj facila lingvaĵo* (1500 vortradikoj sen glosoj),
- *enhavo tre varia*: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesajoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkulturo, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

Jubileo samtempas kun organiza renovigo

La centa numero de "Juna amiko" aperos en marto 2002 kun speciala aldono de koloraj fotoj el infanaj aranĝoj dum 2001. La jubileo koincidos kun gravaj organizaj ŝanĝoj, kiujn legantoj de IPR povis antaŭsupozi, laŭ

la alvokoj por varba direktanto (IPR 2000/4, p. 31) kaj administranto (2001/1, p. 21). Tiuj feliĉe portis fruktojn kaj la novaj gvidantoj ekfunkcias. Tiuj disponigos specimenajn ekzemplerojn kaj abon-informojn al ne-abonantaj petantoj. Unu jarabono kostas 11 EUR, sed ekzistas fortaj rabatoj por livero de kolektoj al klasoj. Restas validaj la perantoj en trideko da landoj, kies adresoj estas troveblaj en la hejmpaĝo de la revuo.

Kun numero 2001/4 ni dissendis novtipan varbileton por la revuo. Tio estas poŝtkarta informilo. Du paneloj prezentas la revuon, tria resumas la verbo-strukturon de Esperanto kaj kvara la vort-faradon. Per tio legantoj povos konvene informi pri la lingvo al amikoj. Unuopuloj povas peti ekzemplerojn, kaj asocioj/sekcioj peti stokon de tiuj varbiloj de la subaj adresoj.

Administranto: Sándor Hideg, Szendrey u 19, HU-2016 Leányfalu, Hungario, <juna.amiko.adm@posta.net>

Varba direktanto: Zoran Ćiric, Branka Miljkovica 14, YU-18000, Nis, Jugoslavio <zciric@EUnet.yu>

Ĝenerala adreso: Juna amiko, pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungario.

Hejmpaĝo: www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto

Redakcio: Géza Kurucz, Hítel u. 10, fszt 16, HU-6000 Kecskemét, Hungario <suli267@szeged.sulinet.hu>

Abontarifoj de Juna Amiko por la jaro 2002

	EUR	USD	2-4 ekz.	Ekde 5	Aere
Tarifo 1	11	10	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 2	6	5,60	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 3	4	3,60	-20 %	-30 %	+20 %
Hungario	600 HUF		480 HUF	420 HUF	—

La liston de la perantoj laŭ landoj vi trovas en la supra TTT-ejo

Stefan MacGill kaj Géza Kurucz


ILEI ĉe la 31a Ĝenerala Konf. de UNESKO en Parizo

Dum tri semajnoj kunvenis en Parizo (Francio, 2001) la 185 membroj-ŝtatoj, reprezentitaj de 230 ministroj, 2532 delegitoj, plus 30 asociaj membroj, 413 observantoj de UN-instancoj, 57 delegitoj kaj 332 reprezentantoj de NeRegistaraj Organizoj (NRO).

ILEI, unu el tiuj NRO-j, estis reprezentita de Jean-Pierre Boulet (Ĵan-Pjer' Bule') kaj Renée Triolle (Rne' Triol'), kiuj faris sian eblon por ĉeesti komisionojn aŭ plenan sesion, servi al aliaj NRO-j, havi kontaktojn kun delegitoj kaj prezenti al ili ILEI, E-on kaj „Interkulturo”-n.

Inter la malfacilaj cirkonstancoj en la mondo, kunvenigi en paca etoso tiom da homoj estis jam sukcesi en si mem, kaj la jara temo, proponita de Irano, „Dialogo inter la kulturoj” estis en si mem respondo al la nunaj problemoj.

Estis inter alie akceptita Rezolucioj pri Kultura Diverseco, sed kiel diris



[surfote: Jean-Pierre Boulet kaj Vincent Charlot; fotis Renée Triolle]

iu delegito el Afriko, „ni tion konstatis, sed nun, ĉu favorigi, ĉu bremsi ĝin?” Revenis konstante la neceso eduki infanojn en la patrina lingvo; la rolo de lerneja kaj eksterlerneja edukado; la neceso eduki la knabinojn kaj instrui ilin en universitatoj; favorigi la instruadon de la malriĉeguloj.

Longe estis debatita la organizo de la kyberspaco: kvankam ĉiuj konsentis, ke indas helpi la uzon de ĉiuj lingvoj kaj ebligi al ĉiuj, eĉ al la plej malriĉaj, aliron al la Reto ĝuste edukcele, sed oni ne sukcesis interkonsenti pri ĝenerala etiko kaj financaj kondiĉoj, ĉefe pri aŭtor-rajtoj kaj senpaga uzo de la reto.

La apartan kunsidon de la NRO-j ĉeestis dudeko da homoj, inter alia Vincent Charlot por UEA kaj Renée Triolle por ILEI. Konstatindas, ke la NRO-j estas ofte la motoro, ĉar ili ne kontentiĝas pri belaj paroloj, sed agas surloke. La Ĝenerala Kunveno de la NRO-j okazis en decembro.

Renée Triolle,

Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, FR-13600 LA CIOTAT

Sen KONTAKTO malfacilas kompreni la mondon

KONTAKTO

KONTAKTO

- ✓ estas la plej vaste legata junulara gazeto
- ✓ rekomendinda por komencantoj kaj instruistoj (parto de artikoloj aperas en la lingvoj "facila" kaj "tre facila")
- ✓ bela kaj modernstila
- ✓ diversa kaj amuza
- ✓ interesa por ĉiuj.

En 2002 KONTAKTO aperos 6-foje. Abonu rekte ĉe UEA/TEJO aŭ ĉe viaj kotizperantoj. Provekzempleroj mendeblas en la Centra Oficejo de TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, NEDERLANDO.

E-INSTRUAJ PROJEKTOJ INTER "ELSTARAJ AGADOJ"

La estrarano de UEA pri informado Andrej Grigorjevskij iniciatis ĉe la retlisto individuaj-membroj de UEA voĉdonadon pri elstaraj E-agadoj en 2001. La tuta kampanjo daŭris unu semajnon ĉirkaŭ la jarŝanĝo. Unue oni rajtis kandidatigi agadojn kun klarigo pri elstareco, poste ĉiu voĉdonemulo rajtis elekti 5 agadojn el la kompilita listo. Kvankam estis nur 9 voĉdonintoj el 9 landoj, la rezulto estas interesa:

Elstaraj E-agadoj' 2001

(vidpunkte de dissendolisto 'individuaj-membroj')

1. La movado de lingvaj festivaloj - 7 voĉoj
- 2-5. La agado de Kolombia Esperanto-Ligo, Projekto "Indiĝenaj Dialogoj", eLibrejo ĉe Esperanto.nu, E-ŝildoj en Brazila stacidomo - po 4 voĉoj
6. E-Euroscola - 3 voĉoj
- 7-12. "Zamenhofa enketado" en 7 rusiaj urboj, Edukado.net, Reformoj en la CO de UEA, la projekto "Interkulturo", TEJO-seminarioj, Retbutiko ĉe Esperanto.se - po 2 voĉoj

Ne mirigas la konvinka "venko" de lingvaj festivaloj, almenaŭ se oni konsideras la voĉdonige prezentitan klarigon pri elstareco de tiu agado: *La movado de lingvaj festivaloj kovras ĉiujn tri agadkampojn de la Strategia Plano de UEA: informado pri kaj utiligado de Esperanto kun sekva instruado al novinteresitoj. Ĝi strebas al profesinivela kvalito (agaddirekto de profesiiĝo). Ĉeforganizantoj, plenumantoj kaj celatoj estas unuavice gejunuloj (plijuniĝo). En iuj regionoj ĝi rezultis per rapida evoluo de la movado (kontribuo al tutglobiĝo).*

Notindas la plejĉeesto de edukaj, instru-instigaj kaj instru-helpaj agadoj. Kvankam oficiale lanĉita nur tri semajnojn antaŭ la voĉdonado, elstarigis ankaŭ edukado.net, verŝajne ĉar (laŭ la voĉdoniga klarigo pri la elstareco): *profesiece organizita kaj altkvalite farata projekto proponanta sin por esti akso de ĉiuj E-instruaj agadoj.*

Post la unuaj reagoj pri la voĉdonrezultoj, la iniciatinto decidis ripeti la voĉdonadon en aliaj esperantistaj retlistoj. Eble ĝi iom ŝanĝos la unuan vicigon de la elstaraj agadoj, sed tion ni ne scios antaŭ la redaktofino de

ĉi tiu numero de IPR. Restas la impresoj, ke elektado de elstaraj E-agadoj en unu jaro devus esti pli plane kaj pli vaste organizita. Estus bone tuj komenci kampanjon "Agado de la Jaro 2002" kun jarfina voĉdonado laŭ prezigitaj kriterioj kaj, eble, kun du jurioj: unu de la vasta publiko, kaj la dua – oficiala kun 3-5 membroj. Ĝi povas esti interesa, alispeca kaj alispica, plimotiviga formo de interna informado, bezonata ĉar pluraj agadoj meritas pli adekvatan rekonon kaj eĥon.

Radojica Petroviĉ, <radp@ptt.yu>

Tutmonda Fabelkonkurso

La fabelkonkurso de la nordfinna kultura Paatalo-instituto okazis la unuan fojon en 1993, pro la iniciato de Kaarina Helakisa (nun forpasinta), unu el la plej vortludemaj kaj elstaraj finnaj verkistinoj/poetoj, skribinta ĉefe por infanoj kaj geknaboj. Ekde la jaro 2000 oni povas sendi al la konkurso esperantajn fabelojn. En 2001 partoprenis en la E-branĉo dudeko da fabeloj el 9 landoj kaj la listo pri la premiitoj jam aperis en Juna Amiko 3/2001 kaj en Esperanto de UEA. En la finna branĉo partoprenis trimilo da fabeloj.

Adoltoj ofte havas tro romantikan kaj dolĉan bildon pri la verkado de geknaboj. La konkursaĵoj tamen pruvas, ke ankaŭ infanoj kaj geknaboj pensas pri problemoj kiaj ekologio, militoj, kontrasto inter malriĉuloj kaj riĉuloj, komputiloj, terorismo, soleco, toleremo, ĉikanado. Ne maloftaj estas en iliaj fabeloj monstroj kaj fantomoj, kiuj deziras ne plu esti aĉaj, timigaj kaj ekskluditaj el la kompanio de bonuloj. Kompreneble inter la fabeloj senditaj al la konkurso legeblas ankaŭ pli tradiciaj rakontoj pri geprincoj, feoj kaj gnomoj, amo kaj magio. En 2002 la limdato kaj premiofesto de la fabelkonkurso iom ŝanĝiĝos. Ĝis nun la premioj estis disdonitaj la 18an de oktobro, kiu en Finnlando estas dato dediĉita al ĉiuj knabinoj kaj virinoj, kiuj nomiĝas Satu (la vorto signifas "fabelo"). Nun la premiofesto okazos la 11an de novembro, kiu estas la naskiĝa datreveno de la amata verkista Paatalo, laŭ kiu ankaŭ la instituto estas nomita. La verkista asocio de Finnlando okazigos sian Fabeltagon la 18an de oktobro, en Oulu-urbo. Pri la konkurso, la organizanto Paatalo-instituto (ekde 2002 estras ĝin O.Buller) kaj la nordorienta municipo Taivalkoski vidu la hejmpaĝon www.taivalkoski.fi.

Raita Pyhala
raitapy@jymy.kase.fi

zaban-e-salam / lingvo de paco

Ni publikigas alvokon de la UEA-prezidanto Renato Corsetti por la kampanjo ZABAN-E-SALAM/LINGVO DE PACO, por helpado al afganaj militviktimoj (plej ofte analfabetaj) per kursoj pri la nacia lingvo kaj Esperanto. Tio evidente aparte koncernas nin kiel Esperanto-instruantojn, des pli ke loke tio estas aranĝata fare de la Irana ILEI-sekcio. Mi esperas ke ankaŭ el la ceteraj landoj ni povos iel subteni tiun kampanjo, kaj eble eĉ poste elpensi similajn iniciatojn por bedaŭrinde similaj situacioj.

Maŭro La Torre

Agado Espero: zaban-e-salam/lingvo de paco

La Esperanto-movado en pluraj manieroj bedaŭris pro la viktimoj de la atencoj en Usono dum la pasinta septembro. Same bedaŭrindaj estas la senkulpaj viktimoj de la milito en Afganujo. Ne estas multo, kion ni povas fari en ĉi tiu milito. La gloraj agoj de niaj antaŭuloj dum, ekzemple, la unua mond-milito ne estas nun ripetebaj. Por tamen substreki la respekton por ĉiuj viktimoj, kaj ankaŭ por substreki la fakton, ke esperantistoj dum sia tuta historio ĝenerale ne akceptis militon kiel normalan manieron solvi intergentajn konfliktojn ("ne al glavo sangon soifanta" - diras tre konata linio de nia himno), la Azia Komisiono de UEA, kun la helpo de kelkaj neaziaj esperantistoj, decidis lanĉi kampanjon, per kiu ni rekte prenas la flankon de la nunaj viktimoj, la afganaj rifuĝintoj en najbaraj landoj.

Nur por doni ekzemplon de la situacio, mi diru, ke en Irano kaj Pakistano loĝas pli ol 4 milionoj da afganoj kiel rifuĝintoj. La plejmulto estas analfabetoj sed ekzistas inter ili instruistoj, inĝenieroj kaj kuracistoj, kiuj en sia lando havis bonan vivon sed pro la longa milito rifuĝis al Irano. Similaj estas la kondiĉoj en aliaj najbaraj landoj.

La kampanjo, kies nomo en la persa (vaste parolata en ĉiuj landoj de tiu mondo-parto) kaj en Esperanto estas "Zaban-e-Salam/Lingvo de Paco", konsistas el tri eroj: 1 - kursoj de Esperanto por afganaj intelektuloj en la najbar-landaj rifuĝejoj; 2 - kursoj por alfabetigi en la nacia lingvo afganajn analfabetajn rifuĝintojn; 3 - materia helpo al la rifuĝintoj; Al tiuj tri eroj laŭgrade aldoniĝos kvara ero, tio estas la starigo de ret-listo "dialogo inter civilizoj" por favori en pluraj lingvoj (inkluzive de Esperanto) dialogon inter azianoj kaj eksterazianoj.

La unuaj konkretaj agadoj komenciĝos en Irano pere de la helpo de iranaj esperantistoj kaj iranaj neesperantistaj asocioj, kiuj jam okupiĝas pri alfabetigo. Laŭgrade ili estos vastigataj al aliaj najbaraj landoj.

La funkciigo de kurso de Esperanto por 20 rifuĝintoj kostas 100 usonajn dolarojn (multobligo de disdonataj materialoj, ktp.). Jam estas planataj du kursoj en Teherano kaj Maŝhado, kiuj komenciĝos en venonta januaro.

Perkoresponda kurso de Esperanto por afganaj rifuĝintoj, anoncota pere de lokaj gazetoj, kostas po 15 usonajn dolarojn (materialoj kaj sendokostoj). Ankaŭ ĝi komenciĝos en januaro.

Alfabetigo de unu analfabeta afgana rifuĝinto kostas 15 usonajn dolarojn (materialoj kaj vojaĝado al la tendaroj de la rifuĝintoj). Ĉi tiu agado komenciĝos tuj, kiam venos la unuaj kontribuoj de esperantistoj, kiuj volas fariĝi subtenanto de unu afgana analfabeto, kiu lernu legi kaj skribi. Materia helpo al la rifuĝinto estas libervola. La mono kolektota en la Esperanto-movado estos rekte aŭ prefere en formo de materialoj bezonataj transdonita al la rifuĝintoj. Mi certas, ke pluraj el vi volos partopreni kaj instigi la esperantistojn de sia lando partopreni. La maniero por kontribui estas simpla: sendu vian monan subtenon al la konto Azia Fondado ĉe UEA, per la kutimaj pagmanieroj al UEA. Vi rajtas indiki "lingvo de paco 1", "lingvo de paco 2" kaj "lingvo de paco 3" depende de la celo, kiun vi volas subteni. Se vi indikos nur "lingvo de paco" ni disdividos vian kontribuon inter la tri celoj. Se vi volas rekte korespondi pri la kursoj de Esperanto kaj pri la alfabetigaj kursoj, bonvolu sendi mesaĝon al "Reza Torabi" <reza@esperanto.org>. Se vi volas rekte korespondi pri materiaj helpoj, bonvolu sendi mesaĝon al "Hans Bakker" <hbakker@groenlinks.nl>. Se vi volas korespondi ĝenerale pri la kampanjo kaj pri la maniero popularigi ĝin inter esperantistoj, bonvolu sendi ret-mesaĝon al "Atilio Orellana" <iei001@worldonline.nl>. Dankon!

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA

Leterkesto

Pri kio okupiĝas ILEI – ĉu nur pri instruado de Esperanto?

Legante la numerojn 2 kaj 3 de 2001 de IPR, revenis al mi tiu supre menciita demando kiun jam ofte mi havis. En ILEI mi membras de dekoj da jaroj (el la epoko de s-ro Sonnabend), sed neniam mi turnis min ĉirilate al ĝi. Probable relative gravas kiel ni instruas la Internacian

Lingvon, kaj eventuale mi povintus eviti disvaporigon de miaj gimnaziaj E-kursoj, se mi aplikintus iujn rafinitajn metodojn...
 Min tamen pli interesas **apliki** nian lingvon por trakti precipe aliajn fakojn, aliajn temojn. Mi havas la impreson, ke ILEI neniel okupiĝas pri ekzemple – problemoj de instruado pri geografio, historio, natursciencoj k.s. Imageble tiel okazas, ĉar mankas la homoj kiuj kapablas, emas kaj liberias por transpreni tiajn taskojn. Se vi volas, vi rajtas publikigi tiun ĉi leteron en IPR por – eble – ekigi diskutadon pri tiu temo, kiu ŝajnas al mi pli interesa kaj – inter pedagogoj – pli alloga ol la **ekskluziva** preparolado de niaj limigitaj aferoj de E-instruado. Laŭ mia impresio, niaj gekolegoj neniel konsideras E-on atentinda realaĵo, tiel ke ili ne „forjetos” siajn tempon kaj forton por serioze okupiĝi pri tia „fantaziaĵo”. Ĉu ili havus esence alian sintenon, se ili konstatus ke ni alportas al iliaj **fakaj** diskutoj, per Esperanto, plej diversaspektajn elementojn kaj vidpunktojn? Almenaŭ en alia kampo, tiu de etnaj minoritatoj mi spertis ke iuj neesperantistoj traktas nin serioze, kiam ni, uzante la Internacian Lingvon sen propagandi ĝin, traktas iliajn aferojn.

*Uwe Joachim Moritz,
 Im Römerfeld 44, DE-52249 Eschweiler*

NdlR: Estimata Kolego! Via ideo plaĉas al mi. Eĉ mi publike petas Vin, estu Vi, kiu la unua kontribuos al nia nova rubriko verkante artikolon pri pedagogia problemo, kiun vi konsideras riparolenda en IPR.



*Surfote: ĉe sama tablo, sur sama ĉevalo (de maldekstre: S. Trenner, R. Petroviĉ, M. La Torre, A. Emanuelsson, B.M. Kim-Lindblom).
 Centre: poto de Stefan MacGill ☺. Fotis: Jozefo Németh, red.*

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario) ✉: bmaxey@visi.net
Elekta: Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil
Kontrolo: Bertil Andreasson, Lars Forsman, Bo Sandelin
Lernaja: Marija Beloŝeviĉ, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä
Regulara: Rob Moerbeek, Hans ten Hagen
Terminara: Maŭro La Torre

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

FIPLV (*Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj*)
 Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**
IEI: *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
UEA: *Universala Esperanto-Asocio*, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Reprezentanto de ILEI: **Maŭro La Torre**; estrarano de UEA pri edukado: **Gbeglo Koffi**.
UNESKO (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verde, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, <grosjean9@caramail.com>

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064. La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: **Boo Mee Kim-Lindblom**, *Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge*; tel. (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>, *postĝirkonto: 682117-7*. IBAN (*Internacia Bank-konto*) numero: SE 2595 000099 604206 821177. *Stokholmo, S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS*. Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: *UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64*. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 39 de Jarlibro 2001. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la engapo.
Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
Hejmpaĝo de ILEI ĉe: <http://il.uniroma3.it/ilei>

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETH József, HU-8531 IIIÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: www.nl-papa.hu/ipr; jozefo@nl-papa.hu; jozefo_nemeth@hotmail.com, tel: +36-89/ 356-050. Laboreja fakso (ĝi funkcias nur en lernotagoj, antaŭtagmeze): +36-89/ 324-896). La retadreso de nia vicredaktorino: katalin@ikso.net! La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leg-handikapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk. La nunan numeron ni sendis al la presejo la 21-an de januaro 2002, **redaktofino por la sekva numero: la 15-a de aprilo 2002.**

SEKCIESTROJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana
✉: selimib@albmail.com

Argentino: Teresita Alaniz, El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral

Aŭstralio: Kay Andersen, P.O. Box 186, Moorooka AU-4105
✉: kjand@ozemail.com.au

Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

✉: raymond.wylleman@pi.be

Brazilio: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

Britio: Malcolm Jones, 1 Regent Avenue, Skipton, GB-North Yorkshire BD23 1AZ

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratiškovice 938
✉: mmelicharek@iol.cz

Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
✉: zdchen@public.wh.hb.cn

Finnlando: Carola Antskog, Dragsfjärdvägen 69, FI-25700 Kimito
✉: cantskog@kolumbus.fi

Francio: Joseph Catil, 5, rue des Calabres, FR-69330 Meyzieu,
✉: joseph.catil@wanadoo.fr

Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürlheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász
✉: jozefo@nl-papa.hu

Irano: Hamzeh Šafii, P.O. kesto 17765-184, IR-Teheran
✉: ilei.ir@esperanto.org

Italio: Luigia Obrerauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma
✉: vmadella@tin.it

Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, JP-181-0001
✉: masumi-s@gw3.gateway.ne.jp

Katalunio: Luz Vázquez, Apartat 553, ES-43200 Reus
✉: ileicat@hotmail.com

Kroatio/KEL: Anicka Jagnjić, Stubička 75, HR-10000 Zagreb,
✉: anicka.jagnjic@zg.tel.hr

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kušanova 59, HR-10000 Zagreb

Kubo: H. Jiminéz, Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de la Habana
✉: kubesp@ip.etcusa.cu

Nederlandio: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag,
✉: iei001@worldonline.nl

Norvegio: Björn Thuv, I.F. Gjerdrums vei 33 NO-1396 Billingstad
✉: bthuv@c2i.net

Pollando: Maria Majerczak, ul. Armii Krajowej 7, m. 122, PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48 12) 638 14 49

Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7. RO-1900 Timisoara

Rusio: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
✉: mirina@online.ru

Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
✉: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com

Svislando: François Randin, Str. Vallombreuse 14, CH-1004 Lausanne
✉: francisko@courrier.com

Togolando: Attiogbe-Agbemadon B., Mensah, T. I. E. To, B.P. 13169, Lome-TOGO,
✉: esp.togo@cafe.tg

Usono: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US)
✉: 72644.2450@compuserve.com

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, AM-375062 Erevan

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 231, Curicó, CL-Séptima Región
✉: strego@ctcreuna.cl

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Nordurbraut 33, 1.h., IS-220 Hafnarfjörður,
✉: loftur@skyr.is

Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

Jugoslavio: Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36, YU-32000 Čačak
✉: radp@ptt.yu

Kongo: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, CG-Lukala (Bas-Zaire)

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon 402-751, Koreio
✉: shcho@inha.ac.kr

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José
✉: miaumiau1@racsa.co.cr

Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-Wellington 1
✉: gwenda.s@hug.co.nz

Portugallio: João Jose Santos Rua da Escola, lote 57 - t/c esq Vale Grande, PT-1675 Póntina
Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.
✉: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-26, UA-43026

Uzbekistano: Eugeno S. Pervertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taškent, CIS
✉: eugeny@esper.gimli.com

Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, VE-Caracas 1071 A